# KOMITATO-KUNSIDO
# de vendredo la 12-a de aprilo 2019

## 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Vendredon la 12an de aprilo 2019, de la 18:45a ĝis la 20:00a, kunsidis en Dovro la Komitato de Espéranto-France:

| Persona nomo | Familia nomo | Mallong. | Komitataneco | Ĉeestas | Senkulp. | Forestas | Rajtigas |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Alexandre | André | AA | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Sylvain | Barrier | SBa | Repr. de la membraro | | ✓ | | AR |
| Claude | Bensimon | CB | Repr. de la membraro | | ✓ | | ER |
| Raymonde | Coquisart | RC | Repr. de la membraro | | ✓ | | DL |
| Xavier | Godivier | XG | Repr. de la membraro | | ✓ | | |
| Aleks | Kadar | AK | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Didier | Janot | DJ | Repr. de la membraro | | ✓ | | MD |
| Maurice | Juy | MJ | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Julia | Hédoux | JH | Repr. de la membraro | | ✓ | | |
| Didier | Loison | DL | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Sébastien | Montagne | SM | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Claude | Nourmont | CN | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Emmanuelle | Richard | ER | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Axel | Rousseau | AR | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Gilles | Tabard | GT | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Flora | Markov | FM | Repr. de FET | | | ✓ | |
| Michèle | Abada-Simon | MAS | Repr. de FKEA | ✓ | | | |
| Jérôme | Caré | JC | Repr. de GEE | | | ✓ | |
| Lucas | Teyssier | LT | Repr. de JEFO | | ✓ | | |
| Jean-Pierre | Boulet | JPB | Repr. de fed. Auvergne | | ✓ | | DL |
| Josette | Ducloyer | JD | Repr. de fed. Bretagne | | ✓ | | AR |
| Gilbert | Stammbach | AG | Repr. de fed. France-Est | ✓ | | | |
| Jean-Lucien | Mazeau | JLM | Repr. de fed. Paris-Île-de-France (anstataŭas Marianne Pierquin) | | | | |
| Florian | Cezard | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | | ✓ | | DL |
| Michel | Dechy | MD | Repr. de fed. Nord | ✓ | | | |
| Marie-France | Condé-Rey | MFCR | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | ✓ | |
| Thierry | Spanjaard | PV | Repr. de fed. Provence (anstataŭas Pascal Vilain) | ✓ | | | |
| Michael | Leibman | ML | Repr. de fed. Rhône-Alpes | ✓ | | | |

19 komitatanoj ĉeestantaj (12) aŭ reprezentataj (7). La kunsido estas kvoruma.

## 0.2. Elekto de prezidanto kaj protokolanto — 5 min

Axel Rousseau prezidas.
Emmanuelle Richard protokolas.

**0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj** **10 min**

**0.4 Decido pri la protokolo de la komitatkunsido de la 27a de januaro 2019** **5 min**

0 kontraŭas 1 sindetenas **18 aprobas**

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

**1.1 Financoj — Rezervoj** DECIDO **10 min SM**

**Voĉdono: ĉu ni ŝanĝu la celon de financa rezervo *Extension du siège* al *Rénovation du siège* ? (vidu la bilancon)**

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**1.2 Renovigo de la sidejo** INFORMO **10 min CB**

Claude sendis raporton pri la renovigo de la sidejo retmesaĝe al la komitato antaŭ la kunveno. Vidu la alkroĉitan dokumenton en lia mesaĝo.

**1.3 *Le Monde de l'Espéranto*** INFORMO **10 min CN**

Claude Nourmont raportas pri la stato de la lasta numero (602), kiu estis ĵus sendita al la presisto.
Tiu numero estis enpaĝigita de profesiulo, tamen aperis kelkaj malfacilaĵoj inter Claude kaj la grafikisto.
Ambaŭ Claude kaj la grafikisto konsentis, ke prefereble ili ne denove laboros kune por LME.
Esperanto-France do devos serĉi alian profesiulon por enpaĝigi la venontan numeron.

Axel kaj Emmanuelle helpos Claude preparis la laboron por la venonta numero, plibonigante la labor-metodojn.

## 2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

**2.1 Projekto Espero: kiel statas?** INFORMO **5 min**

Nome de Esperanto-Provence, Thierry Spanjaard raportas pri la stato de tiu projekto. Ili bezonas 10 000 eŭrojn por realigi tiun projekton, sed ĝis nun, ili enspezis nur etan parton de tiu sumo.

Homoj povas donaci monon por tiu projekto ĉe
https://www.kisskissbankbank.com/fr/projects/esperanto-kaj-la-franca-frate-en-komuna-muzika-projekto

Ĝis nun, ili rikoltis 500 € per kisskissbankbank. Pri la demando ĉu eblas doni atestilon por la impostoj al tiuj, kiuj donos monon pere sia UEA-konto, la respondo estas ne, ĉar tiukaze UFE estus nur peranto.

**2.2 Agado pri la eŭropa baloto** DISKUTO **5 min DL**

Ne estas multe por diri ĝis nun. Tamen ML havas kelkajn informojn.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, ...)

*traktota dum la 2a komitatkunsido*

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

**4.1 Metodo 11** **INFORMO 5 min AR**

La eldono de 2018 estas preskaŭ elĉerpita, kaj Esperanto-France prilaboras novan eldonon, kun kelkaj korektoj. Françoise Noireau kaj MAS proponis sin por provlegi la libron kaj oni aldonis ankaŭ diversajn proponitajn ŝanĝojn. Komence de aprilo, ni sendos la novan version al la akademio, por ke ili kontrollegu.